

Esperanto-festo 2018 **Jarkunsido de la federacio**

La antaŭan tagon de la Esperanto-festo en Graulhet

8a de decembro – 18h30 – Asocia Domo de Graulhet

Ĉeestis : Francis, Michel (Tarn), Flo (Eurokka), Marion (EKC), Pierre (Oloron, 64, membre EKC)

Senkulpigis : Christophe, Gilbert kiuj donas povojn al Marion. Véro, kiu informis ke ŝi ne plu deziras membri en la komitato.

Agad-kaj financ- raportoj prezentis Marion :

Rimarkoj: altaj bankokostoj pro malfrua fermo de la konto CCP (Marion zorgis nur en Aŭgusto) kaj plie kostis 60€ por fermi ĝin !. Nun, la federacio havas nur ŝparkonton (livret A) kiu normale nenion plu kostos al ni.

Aldonoj en la agadraporto : Asocia Forumo en Graulhet, 8 personoj en la kurso de Graulhet, Eurokka partnero de la tago pri Ekzilo en la Chapelle, pri amassendo zorgis EKC.

=== Unuanime aprobitaj

- **Portalo** : nova adreso estos occeo.net : Marion kaj Florian (de la federacio LR) proponas

Occeo.net : mallonga nomo kiu ebligos uzi adresojn kiel :

toulouse@occeo.net

toulouse.occeo.net

=== En ordo

=== Esperanto-Tarn ne deziras apartan retejon en la portalo(malkiel Toulouse), nun, paĝo sufiĉas.

=== Marion proponas al aktivuloj de Tarn kaj de Arieĝo aŭ el aliaj partoj de la regiono, trejnadon por lerni kiel ĝisdatigi paĝojn, publikigi eventojn, artikolojn en la nova portalo (kelkaj cimoj solvotaj antaŭe)

- **Rilato kun la federacio Languedoc-Roussillon** : principo de 2 renkontiĝoj jare inter aktivuloj de eks-MP kaj de eks LR por pli bone koni unu la aliajn kaj lanĉi aliajn komunajn projektojn. Unu renkontiĝo en ĉiu eks-regiono

Por Midipy, Marion proponas renkontiĝon kadre de SEMEO meze de Marto (Ekzemple, sabaton la 16a matene por ke la veturkostoj uzu por ambaŭ kaj ne aldoni plian daton en niaj plenaj agendoj)

≡ En ordo

- Alvoko al lokaj grupoj (el iu Alain el Lozero) : gastigi buson de amatoraj artistoj el Pollando

=== Bezono de pli da informoj. Marion plusendos la mesaĝon

- **Perpoŝta amassendo** pagita de la federacio pasintjare (inter 200 kaj 250 adresoj) 200€ (krokodil' + cirkulero + aliĝiloj + informoj pri ĉiu asocio). Marion ezitas ĉar multe da laboro por efiko malfacile talsebla.

Michel (kaj aliaj ?) povos helpi

=== Ni provos refari

Komitato :

Neniu ŝanĝo krom demisio de Vero.